persekioja Lietuvos veikėjus. Visi žinome skūpumą ir godumą Zavadzčio, taigi, kada mums spauda tapo sugražinta, norint Zavadzčis už atgavimą tos spaudos nekovojo ir ant tos šventos kovos nė vieno grašio niekad nepaaukavo, tai, vienok, geresnį gešeftą suvuodęs, pasinaudoti drįso—ir neilgai trukęs pradėjo lietuviškomis knygomis biznį varyti. Pirklių netrukus atsirado, nes užveizėtojas Čėsna rūpinosi išrašyti iš visų šalių lietuviškas knygas, kad jomis klijantų reikalavimams užganėdinti. Tarpe daugelio perkančiųjų pas Zavadzčį knygas, užeidavo ir narsesni Lietuvos veikėjai, kun. Šopara ir kun. Stakiala, kurie, norint visados už knygas gražiai apsimokėdavo, vienog, už lietuvių vystę taip nepatiko Zavadzčiui, kad šis ponas tuo pereikalavo, kad Čėsna šiem dviem kunigam netik neparduotų knygų, bet dar, kad išmestų abu kunigus iš knygyno. Čėsna, vienok, nepaisė ant noro savo principolo. Jis netik nepaklausė gaspadoriaus, bet dar tankiai tiems dviem kunigams pabargindavo, už ką Zavadzčis labai įpyko ir atsake Čėsnai vieta, norint tas žmogus buvo jam labai naudingas, kaip galima buvo matyt iš tovieninio pakėlimo algos jam.

Ir labai daug panašių faktų galima būtų čion aprašyti, kas link Zavadzčio politikos su lietuviais. Norėdamas vienok užbaigti šį straipsnį turiu paminėti dar vieną faktą, kurs visiems Lietuvos žmonėms yra gana svarbiu.

Visi žinome, kad uždraudus Muravjovui mūsų pusėje spausdinti lietuviškas knygas, neužmirštamoms atminties mūsų vyskupas Motiejus Valančiauskis susižinojo su Prūsais ir pradėjo anoje pusėje knygas leisti ir slapta šianai gabenti. O kad valdžia negalėtų prie tų prūsinių knygų kabinėtis, a. a. vyskupas sutarė su šito jaunojo Felikso Zavadzčio tėvu dėti ant lietuviškų knygų jo firmą t. y. «Juozapas

Zavadzkiš—Vilniuje». Teip buvo vartojamas tas parašas per 40 metų ir išlaikė lietuvių atmintyje Juozapo Zavadzkišo vardą, kuriuo dabar sūnus naudojasi, kaip savu. Jeigu, vienok, Prūsai jo vardo nebūtų dėję ant lietuviškų knygų, tai ir jo vardas per tiek metų, būtų tarp lietuvių visai negirdėtas arba užmirštas ir šiandien lietuviai nebūtų visai žinoję ar koks Zavadzkiš yra kada buvęs šiame pasaulyje. Ir dabar sūnus nebūtų galėjęs pradėti tokios plačios vaisbos lietuviškomis knygomis ir nebūtų galėjęs daugiau lietuvių pinigus rinktis. Tai gi iš tokio vyskupo Motiejaus ir Prūsų darbo, rodos, šitas ponas tiktai džiaugtis privalytų ir dėkavoti, kad toks apsisvertimas ligišiol jo firmą lietuvių atmintyje išlaikė.

Naudotis jis naudojasi tomis pasekmėmis, bet savo keliu štai ką dirba. Jisai apskundžia Prūsų spaustuvininkus p. J. Schoenkę ir p. Otto von Mauderodę, kam jie dėję jo firmą ant lietuviškų knygų ir iš to sukrovę pinigus. Jisai dabar nor, kad jam būtų, pagražintas tas pelnas, kuri, dėdami jo firmą, ištraukė Prūsai iš lietuviškų knygų spausdinimo. Kitaip sakant, jisai nor nubausti savo naudai Prūsų spaustuvininkus už tai, kad jie spausdino Prūsuose ir platino Lietuvoje uždraustas Muravjovo lietuviškas maldų knygas.

Jis nežiūri nė savo tėvo sutarties su vyskupu Valančauskiu, nė atlikto darbo sventumo, nė to, kad jam pagalios didžiausia nauda iš to pasidarė. Jis tik žiūri, kaip nors pasisemti dar daugiau aukso iš perkentėtų Lietuvos nelaimių. Geriausiai mūsų vadovus, kurie kovojo už lietuviškos spaudos pagražinimą, ir kurie šiandien tėvynės labui pasišventę darbuojas, boikotuoja, arba dviem valdžiom skundžia, o iš jų darbų pasekmių tūkstančius sau krauna.

Broliai lietuviai! Ar męs vis ramiai žiūrėsime į tokius nelabus darbus? Gana snaudulio, prasiplėškime akis! Kam męs nešame savo kruvinai užvargta skatiką. Męs šiandien turime gana savų spaustuvų, savų knygynų Vilniuje ir kitur, kur męs visko dar pigiaus galime gauti. Eikime tad tik pas savuosius. Boikotas už boikotą—ir męs boikotuokime tokius priešus. Neikime pas Zavadzkį pirkti, neduokime jam rankraščių ir t.t. Tegul sau Zavadzkiš ir K^o skvernus pakėlę iš mūsų sostapilio į Varšavą, drožia! O ne mūsų kunigai ir Tėvynės veikėjai iš Vilniaus. Čion Lietuva, čion pilis Gedimino! Eikime tad tiktai pas savuosius. Teprasmenga mūsų priešai! Tegyvuoja lietuvių vienybė. Šelpkime savo Tėvynei darbavusius ir darbuojančius, savo apleistus ir užmirštus senelius ir mokslą einančius!

Visi už vieną ir kiekviens už visus!!

Vilniaus lietuvių kuopa.

VILNIUS.

«Vilniaus Žinių» spaustuvė.

1906.

besidengusioji, bet daug puikiau ir pigiau
ž Zavadzki atliekanti darbus, lietuviškoji
p. M. Kuktos spaustuvė; Kaune — Banaitis,
šeinuose Laukaitis iš B-vė. Teip, pilnai
apseiti galime be Zavadzki.

Lietuviai prisidedami prie abskelbtojo
boikoto, parodys kitataučiams, kurie iš jų
minta iš dar niekina, kad nebesiduos dau-
giau savęs ant pajuokos, kad neduos savęs
už nieką laikyti.

Šelpkime savuosius. Į Varšuvą kelias jums,
lenkomanai!

Svarbiausieji atsitikimai.

Darbininkų atstovų tarybos byla. Se-
niai jau prasidėjusi buvo ta byla, viena iš
didžiausiųjų. Visa pasaulė žiūrėjo int dar-
bininkų išrinktuosius, visi klausėsi teisybės
žodžių iš jų pačių lupų ir jųjų apginėjų.
Jų apginėjai norėjo iššaukti kai katruos liu-
dininkus iš aukštesniųjų, kaip buvusius mi-
nisterius Vitte ir Durnovo, tai teismas ne-
leido. Apskritai teismas kliudė teisybės išai-
škinimą. Tada apginėjai ir teisiamieji nu-
tarė pasišalinti iš teismo salės ir nebėklau-
syti jo ištarmės. Teip ir padarė rodydami
tuo savo protestą prieš užmačią. Dabar tei-
smo rumas išdavė jau nuotarmę, pagal ku-
rios Tarybų pirmininkas Črustalev-Nosar
ir 14 sąnarių ištremiami katorgon su visų
tiesų atėmimu, du—pasmerkti stiprumon 1¹/₂
metams. Kiti išteisinti.

Petrapilės aukštesnės mokslinės nutarė
išreikšti pasveikinimą ir užuojautą pasmerk-
tiems.

Žinių-žinėlės.

Vilnius. Spalių 24 d. miesto salėje buvo
vaidinama „Birutė“ p. Žemkalnio (žodžiai) ir

p. Petrauskio (kompozicija) veikalas. Vaidinimas, ypač dainos, išėjo gana gerai. Vaidelytės, Palangos lietuviai, Keistutis, Birutė prisikėlė lyg gyvi — ir prisiminė visiems mačiusiems brangi praeiga; kuomet Lietuva buvo liuosa ir tėvynės ir laisvės meilė sutvaksėjo labiausiai dar nevieno lietuvių širdyje, sužadinta dainos žodžiais:

„Mūsų luomų nežinom, visi esam lygūs,
Kovojam ir einam išvieno.

Todėlei drebėkit jūs puikus valdovai,
Sutrins jus lygybės pajėga“....

Per vakarą, pertraukose, buvo kiek padalyta viršminėtų knygelių apie Zavadzkių boikotą. Stebėtina pasirodė mums čia vieno iš vakaro vedėjų pasielgimas. Bripuolės prie dalynančios jas inteligentiškos lietuvaitei tasai ponas dikčiai įtužęs ir įbines išverstom akim pradėjo kolyti ją ir dar gi visai ne lietuviškai šukauti „Von“ — Toksai ne-intelligentiškas ir nelietuviškas pasielgimas to pono pakėlė tarp matančiųjų tą papiktinančią sceną įvairias kalbas. Vieni sakė — buk tai esąs Zavadzkių žentas, ar svainis. Kiti — jog samdomas ginti jo nelemtus darbus advokatas.

Malonėtumėm tik, kad tasai ponas ant kito karto truputį labiau susilaikytų, nors kad ir Zavadzkių žentas bei advokatas būtų.

— Atsidarė čia šiomis dienomis naujas lietuvių knygynas „Lietuva“ — Adresas jo: Aušros Vartų gatvė; № 29.

— Vilniaus Vyskupas išvažiavo Ryman.

la piajn fidelulojn ke ili oferu la komunion por la savo de Francando. Ili bonvolos ankaŭ repeti la belan preĝon : « Venu, « Sankta Spirito, plenigu la korojn de viaj fideluloj, bruligu en « ili la fajron de via amo. Elsendu vian Spiriton, kaj kreo « ekfariĝos, kaj la vidiĝo de l'tero estos renovigata, *Emitte Spiritum tuum et creabuntur. Et renovabis faciem terræ.* »

En Tournay (Turne), la 18^a de Aŭgusto, 1906.

Deziderato Jozefo, Ĉefepiskopo Mehlena.

Antono, Ep. Genta.

Gustavo Jozefo, Ep. Brugena.

Karlo Gustavo, Ep. Turneja.

Tomo Ludoviko, Ep. Namura.

Martino Huberto, Ep. Lieĝa

Esperantigis V. O. (ZOERZEL)..

PAĜO DE L'DIREKTORO

Senkulpigoj. La legantoj bonvolos min senkulpigi pro la malfruo de tiu ĉi numero, kaŭzata de tro multaj laboroj dum oktobro, la unua monato de miaj profesoraj devoj. E. K. novembra aperos ĝustatempe.

Pri la Kongreso II-a. En E. K. novembra oni legos artikolon pri la Kongreso. La aŭtoro promesas diri aferojn ankoraŭ ne diritajn, malgraŭ la bonaj kaj interesaj raportoj de niaj kunfratoj.

Grava aliĝo al Esperanto. Ni plezure konigas, ke Pastro J. Bricout, la eminenta Direktoro de l'*Revo de Frauca Pastraro* (110 paĝo duonmonate) fariĝis Esperantisto. Li jam skribis al mi du longajn leterojn en bonega stilo. Li promesis presigi la enhavon de E. K. en la rubriko *Tra la Gazetoj* de lia tre grava revuo. — Ni tre konsilas al niaj amikoj alilandaj, ke ili klopodu por esperantigi direktorojn de revuoj katolikaj, kaj por publikigi en tiaj gazetoj l'analizon de l'artikolaro de E. K.

Ekzemplo sekvinda. D-ro Achillo Tellini, el Udine, Italujo, mendis de ni 100 malnovajn ekzemplerojn de E. K. por propagandi. Kompreneble, ni vendas tiujn malnovajn nume-

rojn tre malkare. Tio estas bonega progagandilo, precipe se oni sendos kune leteron klarigan kaj ŝlosilon Ĉefec'an.

Niaj ilustritaj libretoj. *Kato kun botoj*, kaj *Cindrulino*, rapide vendiĝas. Ni memorigas, ke ili tre taŭgas por eklernantoj, por kursoj, por tiuj, kiuj lernas Esperanton sen profesoro. Ili ja sufiĉas kun ŝlosilo Ĉefec'a por plena kono de la lingvo. Rekomendu ilin al viaj amikoj.

Atentu niajn *avizojn* kaj *anoncojn* sur la kovrilo de E. K. Ofte oni skribas al ni por peti informojn, kiuj troviĝas sur la kovrilo. — Kiam vi skribos pri anonco al l'anoncinto, *bonvolu ĉiam diri, ke vi legis ĝin en E. K.*

Nova sento! Ŝajnas, ke la « nova sento ne ankoraŭ tuŝis la korojn de kelkaj homoj, konsiderataj kiel *abonintoj*! Ili obstine konservas la malnovan kutimon nepagi sian abonon antaŭ ol oni ĝin multfoje postulis; — aŭ antaŭ ol la jaro estas finita; — aŭ antaŭ ol oni sendis, *unue fakturon, due poŝtan kvitancon*. Estas eĉ kelkaj, kiuj la abonon tute ne pagas, post ricevinte la gazeton dum tuta jaro.

Mi esprimas la deziron, ke la « nova sento » pri frata helpo eniru en la korojn de l'Esperantistoj, konsiderataj *kiel abonintoj* ke ili distingiĝu de ceteraj « abonintoj » per granda zorgo por *sendi mem* l'obonmonon al la gazetoj Esperantistaj. Atendante, mi estas devigata uzi la helpon de l'banko *Comptoir d'Escompte* por pagigi la abonojn de l'*tria jaro* ne ankoraŭ pagitajn. La nepagintoj bonvolu afable akcepti la oficistojn de la dirita banko. — La nomaro de la jam pagintoj aperos en E. K. novembro.

La Pregaro: la 1-a kajero nun ekpresiĝas; sed la korektado postulos ian tempon.

LA LASTA ABENCERAĜO

DE CHATEAUBRIAND (*Sekvo*)

Post li, du nigraj sklavuloj haltigis per la enbuŝaĵo ĉevalon Araban, kies fumantaj naztruegoj kaj disigitaj haregoj anoncis samtempe ĝian vivecegon kaj ĝian timon, pro la bruo de l'ondoj,

La ŝipo alvenas, mallevas siajn velojn, tuŝas la digon, prezentas la flankon : la Maŭro eksaltas sur la bordon, kiu resonas pro la bruo de liaj armiloj.

La sklavuloj eligas la kurĉevalon, nigran kiel leopardo, kiu blekas kaj ĝoje saltegas retrovante la teron. Aliaj sklavuloj elŝipigas dolĉe korbon, en kiu ripozas gazelo kuŝita inter palmoj. Ĝiaj delikataj kruroj estis ligitaj kaj falditaj sub ĝi, por ke ili ne rompiĝu pro la movoj de l'ŝipo : ĝi havis ĉirkaŭkolon el aloaj grajnoj ; kaj sur orlado, kiu kunigis la du ekstremajojn de l'ĉirkaŭkolo, estis gravuritaj, arabe, nomo kaj talismano.

Blanka rekonas Aben-Hamet'on : ŝi ne kuraĝas malkaŝi siajn sentojn antaŭ la okuloj de l'popolamaso ; ŝi foriĝas, kaj sendas Doroteon, unu el siaj servantinoj, por averti l'Abenceraĝon, ke ŝi atendas lin ĉe l'Maŭra palaco.

Ĉi-momente Aben-Hamet prezentis al la reĝestro sian *firma-non* (1) skribitan per lazuraj literoj sur multekosta veleno kaj metita en silka ingo.

Doroteo alproksimiĝas kaj kondukas la feliĉan Abenceraĝon al la piedoj de Blanka. Kia entuziasmo, retrovante sin ambaŭ fidelaj ! Kia feliĉo sin revidi post tiel longa forestado ! Kiaj novaj juroj ĉiam interami !

La du nigraj sklavuloj alkondukas la Numidan ĉevalon, kiu anstataŭ selo, havis nur sur la dorso leonfelon alligitan per zono purpura.

Oni poste alportas la gazelon.

— Sultanino, diras Aben-Hamet, ĝi estas kapreolo de mia lando, preskaŭ tiel malpeza kiel ĉi.

Blanka malligas mem la ĉarman beston kiu ŝajnis danki ŝin per la plej dolĉaj rigardoj.

Dum la forestado de l'Abenceraĝo la filino de l'duko de Santa-Fe estis studinta l'araban lingvon : kortuŝate ŝi legis sian propran nomon sur la ĉirkaŭkolo de l'gazelo.

Ĉi-tiu, liberigita, apenaŭ subteniĝis sur ĝiaj piedoj tiel longe ligitaj ; ĝi kuŝiĝis teren, kaj apogis sian kapon sur la genuoj de sia mastrino.

1. Turka vorto kiu signifas *dekreto de ĉefnobelego*.

Blanka prezentis al ĝi novajn daktilojn, kaj karesis tiun kapreolinon de l'dezerto, kies maldika haŭto konservis la parfumojn de l'aloaligno kaj de l'rozo Tunisa.

L'Abenceraĝo, la dukino de Santa-Fe kaj lia filino kune foriris Grenadon.

La tagoj de l'feliĉaj geamantoj pasis kiel tiuj de l'antaŭa jaro: samaj promenadoj, sama bedaŭro pro la vido de l'patrujo, amo, sama aŭ, pliĝuste, amo ĉiam egiganta, ĉiam reciproka; sed ankaŭ ĉe la du amantoj, sama fideleco al la religio de siaj prapatroj.

« Fariĝu kristana », diris Blanka. « Fariĝu mahometana », diris Aben-Hamet; kaj ili ankoraŭ disigis ne cedinte al la pasio, kiu allogis unu al l'alia.

La trian jaron Aben-Hamet revenis, kiel tiuj migraj birdoj kiujn, printempe, amo revenigas en niajn landojn. Li ne trovis Blankan ĉe la bordo; sed letero de tiu adorata virino sciigis al l'Arabo fidele la foriron de l'Dukino de Santa-Fe al Madrid, kaj l'alvenon de don Karlos en Grenad. Don Karlos estis akompanata de franca militkaptito, amiko de l'frato de Blanka.

La Maŭro sentis sian koron premita, legante tiun ĉi leteron. Li foriris de Malaga al Grenad' kun la plej malĝojaj antaŭsentoj. La montaroj ŝajnis al li terure dezertaj, kaj li turnis kelkfoje la kapon por rigardi la maron, kiun li ĵus estis transirinta.

Blanka, dum la forestado de sia patro, ne povis forlasi fraton amatan, fraton kiu volis donaci al ŝi ĉiujn siajn bienojn, kaj kiun ŝi revidis post sepjara forestado.

Don Karlos tute havis la kuraĝecon kaj fierecon de sia nacio: terura kiel l'almilitistoj de l'Nova-Mondo, inter kiuj li faris sian unuan militiron; religia kiel la hispanaj kavaliroj, venkintoj de l'Maŭroj, en sia koro li nutris, kontraŭ la nekristanoj, la malamon, kiun li heredis de l'Cid'a sango.

Tomaso de Laŭtrek, de l'glora familio de Foix, kie la beleco de l'virinoj kaj la valoro de l'viroj ŝajnis dono hereda, estis frato duanaskita de l'grafino de Foix kaj de l'brava, malfeliĉa Odet de Foix, landsinjoro de Laŭtrek.

Kiam Tomaso estis dekokjara, Bayard igis lin kavaliro, dum

tiu returna marŝado, kie la kavaliro *sentima kaj senriproĉa* perdis la vivon.

Iom poste Tomaso estis vundita kaj kaptita en Pavio, defendante la reĝon-kavaliron, kiu tiam perdis ĉion, *escepte la honoron*.

Don Karlos de Bivar, ŝatinta la bravecon de Laŭtrek, zorgigis pri la vundoj de l'juna Franco, kaj baldaŭ inter ili formiĝis unu el tiuj heroaj amikecoj, kies fundamentoj estas estimo kaj virto. Francisko I-a revenis Francandon, sed Karlo-Kvin-a detenis la aliajn kaptitojn: Laŭtrek havis la honoron partopreni la kaptitecon de sia reĝo, kaj kuŝi ĉe liaj piedoj en la malliberejo.

Restinta en Hispanujo post la foriro de l'monarko, li estis donita, laŭ sia ĵuro, al Don Karlos, kiu ĵus kondukis lin Grenad'on.

Kiam Aben-Hamet sin prezentis ĉe la palaco de don Rodrig —, kaj estis kondukita en la ĉambregon, kie troviĝis la filino de l'duko de Santa-Fe, li sentis turmentojn ĝis tiam nekonatajn de li.

Ĉe la piedoj de dona Blanka sidis junulo, kiu ŝin rigardadis silente, kvazaŭ ravita. Tiu ĉi junulo vestiĝis per bubalfela pantaloneto, kaj mallonga vesto samkolora, premita per ledzono al kiu pendis glavo kun lilifloroj. Silka mantelo estis jetita sur liaj ŝultroj, kaj ĉapelo kun mallargaj bordoj, ornamita per plumoj, kovris lian kapon: punta krispo, mallevita sur lia brusto, aperigis lian nudan kolon. Du lipharoj tiel nigraj kiel ebono donis al lia vizaĝo, nature dolĉa, viran kaj militan ŝajnon. Largaj botoj, kiuj falis kaj faldiĝis sur liaj piedoj, portis oran spronon, signon de l'kavalireco. Iom pli malproksime staris alia kavaliro apogita sur la fera kruco de sia longa glavo: li estis vestita kiel l'alia kavaliro, sed ŝajnis pli aĝa. Lia ŝajno severmora, kvankam fervora kaj pasia, inspiris respekton kaj timon. La ruĝa kruco de Kalatravo estis brodita sur lia vesto kun tiu devizo: *Por ŝi kaj por mia reĝo*.

Ekkrio senvola eliris el la buŝo de Blanka, kiam ŝi ekvidis, Aben-Hamet'on:

— Kavaliroj, ŝi diris, jen estas la nekristano, pri kiu mi tiom parolis al vi; timu ke li venkos. L'Abenceraĝoj estis al

li similaj, kaj neniu superis ilin pri lojaleco, kuraĝo kaj ĝentileco.

Don Karlos alpaŝis al Aben-Hamet

— Sinjoro Maŭro, mia patro kaj fratino konigis al mi vian nomon ; oni kredas vin el nobla kaj brava raso ; vi mem distingigas per via ĝentileco. Baldaŭ Karlo-Kvina, mia mastro, militos al Tunis'o, kaj ni vidos nin, mi esperas, ĉe la honor-kampo.

Aben-Hamet metis la manon sur sian bruston, sidiĝis teren ne respondante, kaj restis kun la okuloj fiksitaj sur Blanka kaj Laŭtrek. Ĉi tiu admiris, laŭ la scivolo de sia lando, la belegan robon, la brilajn armilojn, la belecon de l'Maŭro.

Blanka ne ŝajnis ĝenata ; ŝia tuta animo estis en siaj okuloj ; la sincera Hispanino ne provis kaŝi la sekreton de sia koro. Post kelkaj silentaj momentoj, Aben-Hamet leviĝis, sin klinis antaŭ la filino de don Rodrig', kaj foriĝis.

Mirita pro la sintenado de l'Maŭro kaj pro la rigardoj de Blanka, Laŭtrek eliris kun suspekto, kiu baldaŭ iĝis certeco.

Don Karlos restis sola kun sia fratino

— Blanka, li diris al ŝi, donu klarigojn. De kio venas la konfuzo, kiun kaŭzis al vi la vido de tiu fremdulo ?

— Mia frato, respondis Blanka, mi amas Aben-Hamet' on ; kaj se li volos kristaniĝi, mia mano estos al li.

— Kiel ! ekkriis don Karlos, vi amas Aben-Hamet' on ; la filino de l'Bivar'oj amas Maŭron, nekristanon, malamikon, kiun ni elpelis el tiuj palacoj !

— Don Karlos, rediris Blanka, mi amas Aben-Hamet' on ; Aben-Hamet min amas ; de tri jaroj li min forlasas plivole ol forlasi la religion de siaj prapatroj. Nobleco, honoro, kavaliereco estas en li ; ĝis mia lasta sopiro mi lin adoros.

— Don Karlos estis kapabla senti, kiom estis grandanima, la decideco de Aben-Hamet kvankam li bedaŭregis la obstinecon de tiu nekristano.

— Kompatinda Blanka, diris li, kien kondukos cin tiu amo ? Mi esperis, ke Laŭtrek, amiko mia, iĝus mia frato.

— Ci eraris, respondis Blanka ; mi ne povas ami tiun fremdulon. Kaj pri miaj sentoj por Aben-Hamet neniu rajtas min demandi. Respektu ciajn kavaliirajn jurojn, kiel mi respektos

miajn jurojn pri amo. Sciu nur, por cin konsoli, ke **Blanka** neniam estos edzino de nekristano.

— Nia familio do malaperos de l'tero ekkriis don Karlos.

— Decas, ke ci ĝin revivigu, diris **Blanka**. Cetere kio estas por ci filoj, kiujn ci ne vidos, kaj kiuj degeneros de cia virto? Mi sentas, don Karlos, ke ni estas la lastaj de nia raso; ni estas tro ekster la komuna ordo por ke nia sango floradu post ni. Cid estis nia prapatro, li estos idaro nia.

Blanka eliris.

Don Karlos rapidegas ĉe l'Abenceraĝon

— Maŭro, diris li, forlasu mian fratinnon aŭ akceptu la batalon.

— Ĉu ci estas komisiita forpeti de mi la jurojn, kiujn ŝi faris al mi?

— Ne, rediris don Karlos; ŝi amas cin pli ol iam.

— Ha! inda frato de **Blanka**! ekkriis **Aben-Hamet** lia interrompante, mi devas devenigi mian tutan feliĉon de cia sango.

Ho feliĉa **Aben-Hamet**! Ho feliĉa tago! mi kredis **Blankan** malfidela, pro tiu franca kavaliro...

— Kaj jen estas cia malfeliĉo, ekkriis siavice don Karlos, kolerega; sen ci li estus mia frato. Pagu do la larmojn, kiujn pro ci verŝas mia familio.

— Mi konsentas, respondis **Aben-Hamet**; sed naskiĝinta de raso, kiu eble bataladis kontraŭ la cia, mi tamen ne estas kavaliro. Ĉi tie mi vidas nenium por doni al mi la ordenon, kiu ebligas, ke ci batalu kontraŭ mi, ne defalante de cia rango.

(*Sekvo venos*)

Tradukis **ELEDA KAJ VINKO**.

EN ESPERANTUJO

REVUO DE LA REVUOJ ESPERANTISTAJ

(Legindaj artikoloj en la revuoj)

Internacia revuo Medicina. — (aprilo). — Redaktita en diversaj lingvoj naciaj kun traduko de ĉiu artikolo en Esperanto. Originalaj artikoloj en Esperanto. — **Kemio aŭ nervoj** (de Prof. akad. Princo I. R. Tarhanov). «Tiel mi titoligis artikolon, en kiu mi volus je fondo de faktoj donitaj, klarigi, kiom

de unu flanko en diversaj suferadoj kaj malsaniĝoj de l'organismo la kaŭzo estas la nervoj, kaj la difektita kemiismo de la korpo aliparte. Kio la plej ofte donas la unuan puŝon al la suferadoj de la homo ? la nerva sistemo aŭ la difektita kemio de la korpo ?... »

El ekzemploj liveritaj sekvas, « ke multaj malsanemaj aproj de psika kaj de korpa ordo, nome la altiĝinta eksciteco, subpremeco, facila laciĝemo, dismalfortiĝeco, malbona humoro, ktp. en esenco devas esti alskribataj al idiopatia malordo de la kemiismo de la korpo, kemiismo, kiusiavice influas ŝanĝmaniere al funkcioj de diversaj organoj de la korpo kaj aparte al certaj nervaj elementoj. » (Esperantigís D-ro Grünfeld).

Espero Pacifista. (junio). — La limigo de la armadoj (de senatano d'Estournelle de Constant), Konkludas, ke ĉiuj nacioj, eĉ Germanujo, kavas grandan intereson limigadi la armadojn. — Esperanto en la kongresoj de Paco (de G. Mh). Konigas la rezulton de la agado de S-o Moch. La Komisiitaro proponas ŝanĝitiele la art. 40-an : « La kutimaj lingvoj de l'Kongreso estas la franca, la germana kaj la angla. La prezidanto de l'Kongreso povas tamen permesi al kongresanoj paroli en la lingvo kies uzon ili preferas. » Oni do ne akceptis oficiale la lingvon Esperanto kiel la ceteraj Sed, aldonas S-o Moch, « Oni povas konsideri la solvon, kiun la komitato proponas, kiel tute kontentiga... Oni povas esti certa, ke konsiderante kiom multaj estos la esperantistoj en la kongreso de 1907, la prezidanto de tiu kongreso ne povos malpermesi nin paroli nian lingvon. »

Lingvo Internacia (1 julio). — Hazono en la eltrovoj (D-ro Cabanès). Tre kurioza kaj plena de dokumentoj. — Gazetaro Esperantista citas E. K. aprilan. — (15 julio). En la ligna ĉevalo (Jules Lemaitre). Epizodo el Homer'a poemo, tre lerte tradukita. — Gazetaro Esperantista detala analizo de artikolo de P-o Dombrovski pri homa saĝmallarĝeco. — Aldono Literatura : la lasta Abenceraĝo traduko de S-o Deshays. Tiu traduko aperis post la komenco de nia publikado de l'sama verko en E. K. — (1 aŭg.). Deveno kaj evolucio de Universo

(Marcel Finot). Historio de l'opinioj pri la demando. Resumo laŭ Haeckel de la sciencaj progresoj. Konkludo de l'aŭtoro « Nia tero estas do nur polvo de suno, simila je aliaj sen-nombraj milionoj da polvoj kiuj trairas tra senlima spaco: Nia homo. Estaĵo malhumila, kiu kredas sin imago de Dio, ne estas pli granda, en tuta universo, ol formiko aŭ mikroskopa bacilo. Ni homoj estas ankoraŭ sur stadioj de evolucio de eterna substanco, simplaj formoj de materia energio, kies ni komprenas la nenion kiam ni estas antaŭ la senlima spaco kaj eterna tempo. » — Tiu konkludo renversas multe da ideoj, proklamas la eternecon de l'materio, — bezonas kiel pruvo pli ol resumo de *Opinioj* de scienculoj.

En tiu n-o, nenio pri la Gazetaro. — (15 aŭg.) Esperanto kaj lingvoscienco (P. Corret). Analizo de leciono farita de Prof. A. Meillet ĉe *Collège de France* pri « La nuna stato de studoj pri ĝenerala lingvoscienco ». Leginda. Bedaŭrinde oni ne analizis la leĝon « laŭ kiu iom post iom difektigas konsonanto inter du vokaloj ». Ĉu la profesoro parolis ankaŭ pri la malapero de kelkaj *konsonantoj* antaŭ alia *konsonanto*? Tio estus tre interesa koncerne Esperanto. — Nenio pri « Gazetaro » — (1 sept.) La Almozulo (de Selma Lagerlôf; esper. J. Lundgren). — Nova Hungara propaganda libro. — Esperantaj lerniloj por Bohemoj. En Aldono Lit. Por kaj kontraŭ Esperanto, Dialogo de D-ro Vallienne. — Nenio pri la « Gazetaro.

Eu ĉiuj numeroj legigas tre interesaj artikoloj pri « Terkultura kalendaro », de Paul Champion.

Internacia Scienca Revuo (Julio). Pri la klostrofobio aŭ angoro pri la malgrandaj spacoj (D-ro Dieterlen Originala artikolo. Ses paĝoj plej interesaj. — Aritmetiko (F. Villareal, el Lima, Peruo). Utile oni legos tion, eĉ post la libro de S-o Bricart.

(Aŭg.) Nekrologio pri P-o Brouardel. La Kalendaro, originala art. de Lengyel Pál. Plene kaj tre science traktas la demandon. — Libreto pri transmorta vivo (de G. T. Fechner, el Germane trad. P. Kadik) « Granda justeco de mondo

konsistas en tio, ke ĉiu mem kreas kondiĉojn de sia estonta vivo. Agoj de homoj ne estas pagataj per eksteraj rekompencoj aŭ punoj; ĉar ne ekzistas ĉielo kaj infero en ordinara senco de kristanoj, hebreoj kaj idolistoj, kien homa animo povus iri post sia morto; animo faras nek salton supren, nek falon malsupren, nek halton, ĝi nek diskrevas nek disfluas en universon, sed, kiam ĝi estos resaniĝinta de granda ŝtuptransviva, malsano, nomata morto, tiam ĝi disvolviĝos trankvile sur tero en kaj por pli alta vivo laŭ neŝanĝebla konsekvenco de naturo... » — Tre konsolanta, ĉu ne!

Tra la Mondo (Julio). — Multego da belaj ilustraĵoj (ĉirkaŭ 25), precipe pri *La Rochelle*. *Mzabo*. *Ghardaia* (Alĝerio), *Aix-les-Bains*, ktp. Riĉa enhavo plej diversa. — (aŭg). Legindaj artikoloj La Tarentelo, Napola danco (de Gr. A. Gallois). — La ruinoj de Wisby (de P. Hedstron). — La Skota glavdanco (de Slater); — Belaj ilustraĵoj de l'pentristo hollanda Rembrant.

L'Esperantiste (julio). — Nefermata Letero al S-o de Beaufront (de Homarano). — Respondo (de L. de Beaufront). — Kroniko. — Esperantistaj Hoteloj. — Ni ne tro grandigu (de Bord). Leginda, saĝa. — Pensoj en aero libera (trad. L. Rigoir). — La morto de Kleopatro (de Franca Akademiano H. Houssaye; trad. Johanino Flourens).

Ruslanda Esperantisto (jun. — jul. en unu kajero. — Nefermita Letero al S-o de Beaufront. La sama, kiu aperis en *L'Esperantiste*, sed subskribata de D-ro Naŭman, el Varsovio. — Kio nun? (artikolo politika pri Rusaj aferoj; trad. Kabbe). — Kio do estas la Homaranismo? de D-o. A. Dombrovski. Tiu artikolo de nia kunlaboranto aperos baldaŭ en E. K.

Esperantisten (jun. — julio en unu kajero). — Esperanto kaj Ruĝa Kruco. — Bona raporto pri la « nova literaturo Esperantista ». — Diras pri E. K.

« Parolinte pri la gazetoj, en unu antaŭa numero, mi forgesis nomi « Espero Katolika », eldonatan de abato E. Peltier en Tours, Francujo. Ne enigante min en demandojn de kredo,

mi volas en tiu ĉi kunteksto konsiderigi la grandvaloron de tio, ke nia lingvo estas prilaborata ankaŭ en la kampo religia tiel, kiel en ĉiaj aliaj. Krom tio, io edificanta estas, malgraŭ multspecaj disigajoj, unuiĝi siatempe en adorado antaŭ tiu Potenco kiu regas la sortojn de l'popoloj kaj kondukas la homajn animojn kvazaŭ akvajn riveretojn. La momentoj, kiujn ni restas meditante antaŭ la eternaĵoj kaj lasenfinajō, neniam estas perperditaj. » — Esperanto en Nordo ; kroniko de la movado Esp.

Antauen Esperantistoj ! (aŭg.). — Pridiskutas nian *Leteron al la Lingva komitato pri literoj supersignitaj*. Konsentas ke ni bezonas alian alfabeton por la okazoj, kiam la presistoj ne havas aŭ ne volas havi literojn signitajn. Sed volas akcepti nur la sistemon *ch, gh, hh, ktp.*

Svisa Espero (jul. kaj aŭg. en unu kajero). — Kroniko de la agado en Svisujo. — Bibliografio: longa kaj bona raporto pri la ŝatinda libro de D-ro Javal *Physiologie de la lecture et de l'écriture* (franca verko). Raportas ankaŭ pri nia ĥeleta libreto ilustrita *Cindrulino*, bonega legolibro por la kursoj Esperantaj.

Alĝeria Stelo, (5 sept.) *Nia lasta eldono*. La redakcio anoncas, ke la gazeto ĉesos aperi kaj diras Adiaŭ al la legantoj. Ni sendas niajn bedaŭrojn kaj sincerajn salutojn al la Alĝeriaj batalantoj. Ni esperas ke, iam, la Stelo reaperos en nia ĉielo.

Suno Hispana (aŭg.). — *Kondolenco* al S-o Codorniu, pro la morto de S-o J. Bosch, patro de lia edzino. — Kroniko pri la movado de Hispanujo. Literaturaĵo.

Centramerika Esperantisto (aprilo-majo-junio en unu kajero, 4 paĝ.). Liveras sciigojn pri la II-a Kongreso. Komencas kurson pri Esp. en hispana Lingvo. Uzas la alfabeton kun *ch, gh, hh, ktp.* Oni legas sur la unua paĝo : « *La viajn intershanghilojn ni donos la plej intereso.* » Ĉu tio estas Esperanto ? — Por la honoro de nia lingvo oni ne devus presi tiajn frazojn... — (Julio, aŭg, sept. 4 paĝ.). — Proponoj al *Lingva Komitato* pri revizio de Esperanto (de Thorvald Kornerup, kan-

didato de shtatscienco, poshtestro, Hjoering, Danlando). La gazeto « nek aprobas, nek tute disestimas ». — Esperanto en Japanujo (angle kaj hispane redaktita). — Adresoj de Japanoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj.

Esperanto (el Budapeŝto: junio. — julio en unu kajero, 12 paĝ.). Kroniko eksterlanda kaj Hungara. — Bibliografio. — Literaturaĵoj.

Esperanto-ĵurnalo reaperis dum la Kongreso. Administracio estas nun en Geneve (Svisujo) kaj en Bellegarde (Ain-Francnjo). Abono estas ĉiam 3 fr, por 24 n oĵ sin sekvantaj. — (Ekster Franci. kaj Svisl. 3 fr. 75) S-o Berthelot ne estas plu administranto. Lin anstataŭas s-o Tarry, quai de l'Ile, 45, Genève.

Notu Bone. — Raporto pri la dua Kongreso aperos en E. K. novembra.

Avizo. — Amasego de materialo por *Notetoj*, amasego de libroj kronikotaj, atendas sur la redakcia tablo. Iom paciencu la amikoj kaj aŭtoroj, kiuj sendis al ni dokumentojn aŭ librojn. Ni ne forgesos ilin en la novembra numero de E. K.

Gravega Alvoko. — Por helpi l'akcepton de la leĝo kiu baldaŭ estos diskutata en la Franca Parlamento, kaj kiu permesos l'instruon de Esperanto en ĉiuj francaj lernejoj, kaj por montri ke Esperanto ne estas malamiko de la naciaj lingvoj, sed ke kontraŭe ĝi povas helpi ĉiujn, S^{ro} P. Boulet, Hon-Sekr de la Grupoj de Boulogne kaj Rouen verkis gramatikon por lerni la la francan lingvon per Esperanto. S^{ro} E. Boirac, rektoro de Dijon, Prezidanto de la Lingva Komitato, skribis l'antaŭparolon — tio estas la plej bona rekomendo.

Sed antaŭ ol presigi la verkon, oni dezirus esti certa ke la vendo estos sufiĉa por pagi la elspezojn —

Mi do sendas energian alvokon al ĉiuj esperantistoj por ke ili helpu l'eldonon de « Franca Gramatiko », tuj skribante al S^{ro} Paul Boulet, 80, Boulevard du Prince Albert, Boulogne-sur-mer, ke ili promesas aĉeti ekzempleron. — Oni sendos 1 fr. 50 tiuj post la ricevo de la libro — La 500 unuaj aĉetantoj ricevos

donace la « Kongresa Libro 1905 » — oni bonvolu skribi tre legeble la adresojn.

Mi plene konfidas je la helpo de la Esperantistoj kaj ilin tre dankas antaŭe.

A. MICHAUX,
Prezidanto de la Boulogne'a Grupo.

AUTOREFERATOJ

I. *Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la V-an Euklidan postulaton.* Verkis Pro A. Dombrovski. Berlino. Presejo de Moller et Borel, in-8° pp, 23 kun 8 figuraĵoj. Prezo 0 fr. 65 c.

II. *Pri novaj trigonometriaj sistemoj.* Originale verkis P-ro A. Dombrovski. Berlino. Presejo de Moller et Borel, in 8° pp. 35 kun 5 figuraĵoj. Prezo 1 fr. 80 c.

1. Esplorante la V-an Eŭklidan postulaton, mi trovis unu specon de kurbaj linioj de tria grado. Ilia priskribo kaj esploro okupas ses unuajn § § de nia unua broŝureto. En la lasta § VII^a mi revenas al la V^a Eŭklida postulato mem kaj montras kvar kondiĉojn, ĉe kiuj ĝi estas nepreciza aŭ fariĝos duba kaj du kondiĉojn almetindajn, por ke ĝi estu precize vera (pp. 18-19^a).

La trovita de mi kurba linio ŝajnas al mi esti rimarkinda precipe en unu rilato, nome, kiel komparilo de Eŭklida plato kun platoj neeŭklidaj, ĉar kiel dependanta de Eŭklida postulato, ĝi dependas ankaŭ de Eŭklida plato kaj tial, se Eŭklida plato ekkomencus sin ŝanĝante preni novajn ecojn de platoj neeŭklidaj, tiuj ĉi ŝanĝoj fariĝus ankaŭ videblaj en la formo de nia kurbo. Kiaj estas tiuj tri ŝanĝoj mi ne trovis. El tiu ĉi kaŭzo mi ripetas mian peton ĉu ne ekvolus iu matematikisto elmontri al mi la ŝanĝojn fariĝontajn en la ekvacio kaj en la formo de nia kurbo ĉe ĝia transiro el regiono de l'geometrio Eŭklida en regionoj de l'geometrioj Riemanna kaj Lobaĉevskia.

II. Sciante ke ekzistas diversaj sistemoj de geometrioj neeŭklidaj kaj nearĥimedaj, mi min ekdemandis, ĉu neekzistas ankaŭ trigonometriaj sistemoj diversaj de nia ordinara. La rezultato de mia esploro superis mian atendon, ĉar mi trovis 27 novajn trigonometriajn sistemojn simplajn kaj montris la eblon

de senfinaj sistemoj kunmetitaj. En mia dua broŝureto mi donas mallongan ĝeneralan priskribon de ĉiuj sistemoj simplaj kaj de kelkaj kunmetitaj Iom pli detale mi priskribas tri simplajn kaj du kunmetitajn (§ § VII-XII).

P-ro A. Dombrovski. Kovno (Rusujo').

-- Bedaŭrinde sur paĝo 7^a enŝteliĝis eraro, Ĝi estos forigita per la represigo de tiu paĝo. La legantojn do, kiuj ricevis ekzempleron kun la dirita eraro — la aŭtoro humile petas, ke ili bonvolu peti de la Direktoro de E. K. la paĝon torektikan.

Lingvaj demandoj en la gazetoj

Pri la finiĝo — acio — icio kaj pri « centjaro », de S-o Hugues, el la Rochelle (*Ling. Int.* 15 jul.)

Analizo de l'Esperanta gramatiko laŭ sinteza metodo, de S-o Evstifeieff (*Ling. Int.*, 15 jul. kaj 15 aŭg.).

Kelkaj pensoj pri — eg kaj — et, de Leo Belmont (*Ling. Int.* 1 aŭg.).

Pri la propra nomoj, de D-ro Cureau (*Int. Scienca Rev.* jul.). — Tre diskutinda.

Ĉu ne bezonas la vorton pluraj, ?, de P. Corret (*Int. Sc. Rev.* aŭg.). — « Jes, por traduki : *pli ol unu.* ».

Pri la propra nomoj, de Lengyel Pal respondo al D-ro Cureau. — Aukaŭ respondo de D-ro Trinité (*Int. Sc. Rev.* aŭg.). Tre utilos al la membroj de la *Lingva komitato* por prilabori la demandon.

Gazetoj kiuj raportis pri la Kongreso

Tre ŝatindaj raportoj legiĝas en *L'Esperantiste* (aŭg. — sept.). — *Tra la Mondo* (sept. kaj okt.). — *Suno Hispana* (sept. kaj okt.). — *Belga Sonorilo* (sept.). — *Unua Paŝo* (sept.). — *Germana Esperantisto*; artikolo germanlingva (sept. okt.). — *La Revuo* (okt.). — *British Esperantist*; artikolo anglolingva (okt.). — *Pola Esperantisto* (okt.).

Novaj Gazetoj Esperantistaj

Naskiĝis jenaj gazetoj, pri kiuj ni raportos en venonta E. K.: *La Revuo*, eldonita de firmo Hachette. Gazeto literatura, kun

la konstanta kunlaborado de D-ro Zamenhof. — *L'America Esperantisto*, propaganda organo por tuta Ameriko *Pola Esperantisto*, duonmonata organo de Societo *Esperanto*, en Lvovo. — *Foto-Revuo*, internacia monata revuo kun ilustraĵoj (franc kaj esperante redaktita). Direktoro ; Ch. Verax la konata kaj certa artisto, aŭtoro de belaj poŝtkartoj.

Al ĉiuj kunfratoj bonvenon kaj saluton. Ni plezure akceptas sendi al tiuj ĉi E. K. interŝanĝe.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de S-o J. ELLIS, el Keighley, Anglujo).

Estis malfacile ekkapti iometon da tempo por ŝakludi en Ĝenevo; tiom da urĝaj kaj pligravaj aferoj okupis nian atenton. Tamen dum la ŝipveturado sur la lago ni vidis ludantojn sin klinantajn supre de la ŝaktabulo. Ŝajnas ke, ĉe ili, la ŝakoj estis pli allogaj ol la belecoj de la pejzaĝo. Kelkaj apudstarantoj ankaŭ rigardis la ludadon, kvazaŭ por diri ke ili bedaŭras, ke ili ne alportis ŝakpecaron. Laŭ la iniciativo de la Direktoro oni anoncis, ke kunveno de ŝakludistoj okazos dum la Kongreso. Jen la oficiala protokolo de tiu kunveno

PROTOKOLO de la Kunveno de Ŝakludistoj, en Ĉambro No. 15, Komerca Lernejo, Ĝenevo, la 1-an de Septembro 1906.

Alestantoj : — Ellis, (Keighley, Angl.) ; Legge, (Mickleover, Angl.) ; Padfield, (Ipswich, Angl.) ; Peltier (Ste. Radegonde Franc.) ; Rebouleau, (Tours, Franc.) ; Reynier, (Lyon, Franc.) ; Schmid, (Bern, Svis.) ; Sexton, (Kingston-on-Thames, Angl.).

S-o l'Abato Peltier estis unuvoĉe elektata kiel prezidanto de la kunveno.

Oni unuvoĉe konsentis 1° : Fondi societeton, sub la nomo Societo de Esperantistaj Ŝakludistoj.

2° : Ke « *Espero Katolika* » estu la oficiala organo de la Societo.

3° Ke la kotizo al la Societo estu la abonpago al E. K., kondiĉe ke la Direktoro de tiu gazeto rizervu duonfrankon el ĉiu abonpago por la kaso de la Societo.

4° Ke S-o Peltier estu la Prezidanto, kaj S-o Ellis la Sekretario de la Societo

5° Ke oni aranĝu, se eble, ke ŝakturniro okazos ĉe la venonta Kongreso.


La alestantoj aranĝis interludi koresponde inter si, kaj la kunveno finiĝis.

Tuja rezultato de tiu kunveno estas, ke la Redaktoro de «British Chess Magazine», la ĉefa angla ŝakgazeto, skribis al la Sekretario por diri, ke li asignos unu paĝon ĉiumonate por Esperanto-ŝakoj se oni sendos al li la manuskripton. La Sekretario respondis, ke kun plezuro li klopodos por tion aranĝi. Sed, do, la samideanoj bonvolos sendi al la sekretario ion interesan por ŝakludistoj, — ludojn, problemojn, novaĵojn pri ŝakoj, pri konataj ludistoj, pri turniroj, — li liveros al B. C. M. tion, kion ĝi bezonas. Per tio, ili helpas Esperantismen en Anglujo, kaj la ŝakgazetoj de aliaj landoj, vidante la ekzemplon al ili donitan, sendube ĝin imitos. Ekzemple, mi scias ke loĝas en Tours S-o Baucher, eble la sola ĝisvivanto, kiu ludis kontraŭ Morphy (v. E. K. No 18). Lia fotografaĵo kaj historieto pri lia vivo kaj ŝakfaroj estus tre akceptindaj de mi por B. C. M. Tiu gazeto kompreneble ne konkuras kontraŭ E. K., ĉar ĝi estas presita anglalingve.

La ludoj aranĝitaj ĉe la Kongreso estas komencitaj. Mi esperas presigi ilin en E. K., tiam tuj kiam mi riceves la ludnoton.

J. ELLIS.

PROBLEMO 9-a
NIGRO : 2 Pecoj.



BLANKO 6 Pecoj.
Nigro estas ŝakmortigata. Kiu estis
1a antaŭlasta iro de Blanko

SOLVO DE PROBLEMO 8-a
(de Steleto).

1-a iro de B estas : K — 7D

Se N 1..... R — 2R (aŭ A)
2. S—6KR R—2R (aŭ B)
3. Ĉ—7KRm.

A

Se N 1..... Ĉ iras
2. K—8Dm.

B

Se N 2..... R—3D
3. Ĉ—7KRm.

Ĝuste solvis: S-o Pierrefitte (Tours),
kiu trovis la problemon « tro facila ».

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro : Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara : 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro : Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio : Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono 23 fr. (En Franc. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj .

IL CITTADINO ITALIANO, duonmonata gazeto en Itala lingvo, raportas pri Esperanto kaj pri L. I. Enhavas bonegajn tradukojn de D-ro Josefo Loschi, Profesoro en Valombrosa *Reĝa Instituto Forsta*. Konsistas el 16 p. kiel *l'Esperantiste*. S-ro P-ro J. Meazzini, de (Arezzo Ital.) ricevis de la Direktoro la taskon redakti la esperantajn aferojn, artikolojn, anoncojn, bibliografiojn, ktp., kaj eĉ ricevi la abonpagojn el eksterlando (jare 3 fr. 50).

➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO : 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro : XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝo de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj sribi por pluaj sciigoj al la Direktoro:

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO
**NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS
 AKCEPTAJAJ SAMTEMPE**

L'AMERIKA ESPERANTISTO

Unua gazeto por la lingvo Esperanto en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko. — Belege presata sur la plej bona kvalito de papero.

Jarabono 1 dolaro ; 5 frankoj ; 2 rubloj ; 4 markoj ; 4 ŝilingoj ; 5 kronoj. — Adreso L'amerika Esperantisto, Oklahoma City. U. S. A.

PENSIO POR GESINJOROJ GENEVO. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

S-o PAULO HEILICH, COLN-SIDENTHAL, gleuelers-trasse 135, (Germanujo), deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj; ĉiam respondas.

S-o PAULO KEILICH, COLN-SIDENTHAL gleuelers-trasse, 135, (Germanujo), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Li sendos poŝtmarkojn germanajn.

LA REVUO — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^o ZAMENHOF. — Ce Hachette k. K^o Paris. — Jare, Francujo : Fr. 6 ; ceteraj landoj Fr. 7.

LINGVO INTERNACIA ESTAS NUN DUONMONATA. — Envasas 32 paĝojn. Sen literatura aldono : 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède, Paris, 5^e.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PAGO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« TRA LA MONDO » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj; arto, literaturo, sciencoj; komerco, industrio; militistaro, maristaro; teatro; sportoj; virina kaj gejunula paĝo; felietono; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaj elspezoj en francaj poŝtoŝtupoj.

VERKOJ de D-ro NOEL (aĉetebraj ĉe Espero Katolika). — Ĉielo kaj Tero, de Byron, trad. 1 fr. 45. — Rolandkanto, trad. en versoj, 1 fr. 70 a frank. — Parolado pri la Metodo, de Descartes, litografita verk , 24 p. en granda formato.